

MODIFPROponoj por la INTERNA REGULARO Julio 2012

La Komitato konsentas aldoni la sekvan punkton:

4.9.4 La Estraro nomumas kaj malnomumas la redaktorojn de siaj revuoj kaj aliaj kompilitaj eldonaĵoj.

La Komitato konsentas aldoni la sekvan frazon fine de punkto 7.1.6:

La estraran elekton gvidas la prezidanto aŭ membro de la Elekto-Komisiono, aŭ – manke de tiu – alia komitatano, kiu ne estas kandidato por estrara posteno.

Komento: En Krakovo, ni praktikis tion, en asocioj tio estas kutima praktiko.

La Komitato konsentas modifi la trian kuglotekston sub 7.2.2.1 jene:

La Prezidanto ... reprezentas la Ligon en eksteraj rilatoj →

La Prezidanto ... reprezentas la Ligon en eksteraj rilatoj, sed rajtas delegi tiukampajn taskojn.

Komento: La prezidanto evidente prenas respondecon pri elpaŝoj (kaj ĉio!), sed ni volas akceptigi, ke tiu frazo ne aŭtomate signifas ke en la estraro la prezidanto devas nepre prizorgi la fakon 'eksteraj rilatoj'.

Iris al:

La estraro de ILEI plus la regulara komisiono: Rob Moerbeek, Atilio Orellana Rojas, Marija Beloseviĉ, plus prezidanto de la elekto-komisiono: Aurora Bute.

6an de julio, 2012